# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 40 Decembro 1930

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

TEKSTO : Ratifoj de konvencioj. — Granda Britujo kaj la 8-hora Konvencio. — Laboro de infanoj en ne-industriaj profesioj. Senlaboreco. — La « Rondtabla » Konferenco pri Hindujo kaj la Internacia Labora Organizaĵo. — Raciigo kaj Senlaboreco. — La 50-a Kunsido de la Administra Konsilantaro. — Paĝo pri kooperado.

## RATIFOJ DE KONVENCIOJ

### Latvio.

La senkondiĉa ratifo per Latvio de la Konvencio *pri kompenso pro senlaboreco okaze de ŝipopereo* estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj.

La 5-an de Aŭgusto 1926, Latvio ratifis la konvencion kondiĉe ke ĝi efikos « nur kiam ĝi estas ratifita de la Potencoj plej gravaj pri mara komerco ».

La 11-an de Marto 1930 la Latvia Deputitaro akceptis amendon al la Leĝo pri ratifo, amendon kiu faras la konvencion efikan en Latvio senkondiĉe.

La 29-an de Aŭgusto 1930 la Konstanta Delegito de Latvio al la Ligo prezentis al la Sekretario Ĝenerala novan ratifon senkondiĉan.

### Germanujo.

La ratifo per la Germana Registaro de la Konvencio *pri dungokontraktoj de maristoj,* akceptita de la Internacia labora Konferenco en ĝia Naŭa Kunsido (1926), estis registrita la 20-an de Septembro 1930.

### Francujo.

La ratifo per la Franca Registaro de la Konvencio *pri kreado de metodoj por starigi minimumajn salajrojn,* akceptita de la Internacia Labora Konferenco en ĝia Dekunua Kunsido (1928), estis registrita la 18-an de Septembro 1930.

### Ratifo per Bulgarujo de la du Konvencioj pri Asekuro kontraŭ Malsano.

La Internacia Laboreficejo estas sciigita, ke Bulgarujo ratifis la konvencion pri asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komercio kaj domservistoj, kaj la konvencion pri asekuro kontraŭ malsano por agrikulturaj laboristoj.

Tiuj ĉi du konvencioj estis akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco en ĝia Deka Kunsido en Genève en 1927. Ĉiu Ŝtato ratifanta ilin sin devigas, ke ĝi starigu sistemon de deviga asekuro kontraŭ malsano aplikata al ĉiuj laboristoj, oficistoj kaj metilernantoj en industriaj kaj komercaj entreprenoj, al hejmlaboristoj kaj domservantoj, kaj al ĉiuj laboristoj, oficistoj kaj lernantoj en agrikulturaj entreprenoj.

La konvencio pri laboristoj en industrio kaj komerco kaj domservistoj estas nun ratifita de naŭ Ŝtatoj : Aŭstrio, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Germanujo, Hungarujo, Jugoslavio, Latvio, Luksemburgo kaj Rumanujo ; la Konvencio pri agrikulturaj laboristoj de kvin Ŝtatoj : Aŭstrio, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Germanujo kaj Luksemburgo.

Bulgarujo nun ratifis 25 konvenciojn.

### Rumanujo ratifas kvar Konvenciojn.

La Internacia Laboroficejo estas sciigita, ke Rumanujo ratifis la kvar jenajn Internaciajn Laborajn Konvenciojn.

(1) La Konvencion, akceptitan en 1920, pri kompenso pro senlaboreco okaze de ŝipopereo. Tiu ĉi Konvencio estas nun ratifita de 17 Ŝtatoj.

(2) La Konvencion, akceptitan en 1920, pri facilaĵoj por la dungigo de maristoj, kiu celas la starigon de senpagaj publikaj dungoficejoj. Tiu ĉi Konvencio estas nun ratifita de 18 Ŝtatoj.

(3) La Konvencion, akceptita en 1921, malpermesantan la laboron de infanoj malpli ol 14 jaraĝaj en agrikulturo dum la horoj fiksitaj por instruo en la lernejoj. Tiu ĉi Konvencio estas nun ratifita de 13 Ŝtatoj.

(4) La Konvencion, akceptita en 1921, pri rajtoj por asociado kaj kombinado de agrikultura laboristoj. Tiu ĉi Konvencio estas nun ratifita de 22 Ŝtatoj.

La tuta nombro de ratifoj de Internaciaj Laboraj Konvencioj estas nun 414. Rumanujo ratifis 16 Konvenciojn.

### Kolumbio kaj Internaciaj Laboraj Konvencioj.

Nova Ŝtato estas aldonita al la listo de Ŝtatoj ratifintaj internaciajn laborajn konvenciojn. Ĝi estas la Respubliko Kolumbio.

Ĝis nun Kolumbio, kvankam ĝi partoprenis en la Kunsidoj de la Internacia Labora Konferenco, neniun informon komunikis al la Oficejo pri aranĝoj faritaj sekve de la akcepto de konvencioj. Tiu ĉi situacio ne daŭros, ĉar la Kolumbia Registaro petis la Nacian Kongreson, ke ĝi ratifu ĉiujn Internaciajn Laborajn Kunvenciojn akceptitajn de 1919 al 1928.

Tiu oficiala ago estas nova ekzemple de la intereso de la Latinamerikaj Ŝtatoj pri la Internacia Labora Organizaĵo kaj de ilia deziro kunlabori pli aktive en ĝiaj taskoj.

### Granda Britujo kaj la 8-hora Konvencio.

La lastaj tempoj vidis gravajn okazintaĵojn en Anglujo pri demandoj koncernantaj la Internacian Laboran Organizaĵon. La 13-an de Novembro, Fno. Bondfield, Ministro de Laboro, prezentis al la Deputitaro projekton de leĝo pri Laborhoroj en Industria Laboro. Ĉi tiu projekto celas efektivigi la Washingtonan Konvencion pri Laborhoroj.

La 19-an de Novembro, la *Times* anoncis, ke hieraŭ Sro. E. Shinwell, Sekretario por Minejoj, ricevis Sron. Stegerwald, la Germanan Ministron de Laboro, kun kiu estis Dro. Sitzler, Dro. Feig, Dro. Classen kaj Sro. Weber.

La diskuto rilatis al demandoj, kiuj probable prezentiĝos en Genève en Junio de la venonta jaro, kiam la Internacia Labora Konferenco denove konsideros la akcepton de Internacia Konvencio pri laborhoroj de subteraj minlaboristoj. La diskuto rezultigis reciprokan komprenon. Oni ankaŭ diskutis la ekonomiajn aspektojn de la internacia problemo pri karbo. Sro. Stegerwald konsentis komuniki la proponojn de Sro. Shinwell al la Germana Registaro.

Parolante poste al reprezentantoj en London de la Germana gazetaro, Sro. Stegerwald diris :

Dum la nuna kunveno en la Ministrejo de Laboro, oni diskutis pri diversaj malfacilaĵoj en la du landoj rilate al la apliko de la Washingtona okhora konvencio. Por faciligi le ratifon, la du Registaroj intencas plie esplori tiujn malfacilaĵojn.

Demandoj pri navigacio estis ankaŭ diskutitaj. Pri la sciigo de la pezo de multpezaj pakaĵoj transportataj surŝipe kaj la protekto de havenlaboristoj troviĝis granda mezuro da konkordo inter la du registaroj. Oni baldaŭ daŭrigos la diskutojn en Hamburg.

La interparoladoj en la Minministrejo rilatis al diversaj demandoj intime koncernantaj la diskutojn, kiuj fariĝos en Genève la sekvontan jaron pri la Konvencio pri laborhoroj en minejoj. Tiuj interparoladoj rezultis per konkordo de opinioj inter la du Registaroj.

### Laboro de Infanoj en ne-industriaj profesioj.

La Internacia Laborolicejo eldonis raporton pri la aĝo por allasi infanojn al laboro en neindustriaj profesioj, kiu estas la unua temo en la tagordo de la Kunsido de la Internacia Labora Konferenco en 1931.

En antaŭparolo, oni montras, ke la protekto de infanoj kaj gejunuloj estas unu el la celoj starigitaj por la Internacia Labora Organizaĵo en Parto XIII de la Packontrakto, kaj ke la sesa de la principoj proponitaj en Artikolo 427 de la Kontrakto estas « la forigo de infanlaboro kaj la difino pri la laboro de gejunuloj de la limigoj necesaj por ebligi la daŭrigon de ilia edukado kaj certigi ilian fizikan disvolviĝon ».

Oni tiam rememorigas, ke la Internacia Labora Konferenco jam akceptis (1919-1921) konvenciojn fiksantajn je 14 jaroj la minimuman aĝon por allasi infanojn al industria laboro, laboro surŝipe kaj agrikultura laboro, kaj je 18 jaroj la minimuman aĝon por servi kiel hejtistoj aŭ karbordigistoj surŝipe. Tiuj konvencioj larĝe sukcesis ; sed restas ankoraŭ granda manko en internacia leĝdono, ĉar nenio ankoraŭ fariĝis por reguligi la laboron de infanoj en neindustriaj profesioj, en iuj el kiuj ili povas esti elmetataj al grandaj danĝeroj. Por plenigi tiun mankon, la Administra Konsilantaro de la Internacia Laborolicejo metis la demandon en la tagordon de la Konferenco en la venonta jaro.

En tiu Kunsido la Konferenco devos fari provizoran studon de la demando kaj decidi ĉu ĝi devos esti temo por plia diskuto kaj definitiva decido en la sekvonta kunsido. Se la Konferenco tiel decidos, ĝi devos difini la punktojn, pri kiuj la Registaroj devos esti konsultataj per demandaro, kiel preparado por la dua kaj fina diskuto.

Laŭ la akceptita praktiko, la Raporto enhavas mallongan komparan analizon de la nuna leĝo praktiko, en la diversaj landoj kaj plurajn tabelojn montrantajn tre klare la situacion. Sur la bazo de la leĝaro tiel priskribita, la Raporto konsideras la eblecon de internacia reguligo kaj atentigas pri la ĉefaj punktoj, pri kiuj estas dezirinde kunsulti la Registarojn antaŭ la decida stadio.

La Raporto konsistigas tre utilan informan dokumenton pri infanlaboro en la neindustriaj profesioj, ekzemple, komerco, publikaj spektakloj, stratovendado, k.t.p. kaj celas prepari klopodon por daŭrigi kaj plivastigi la laboron por la infanoj jam faritan de la Internacia Labora Organizaĵo dum la lastaj dek jaroj.

### Senlaboreco.

Senlaboreco pli kaj pli graviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj. Grandaj klopodoj fariĝas por mildigi ĝiajn konsekvencojn, kaj ĝiaj kaŭzoj estas temo por konstanta studo kaj diskuto de ĉiuj interesatoj kaj speciale de la Internacia Laborolicejo, kiu, depost sia fondo, dediĉas multe da energio al la esplorado de tiu problemo kaj de la eblaj rimedoj.

La plej lastaj ciferoj montras, ke la situacio multe pli malboniĝis dum la pasinta jaro. La diferencoj en statistikaj metodoj en diversaj landoj malfaciligas la komparon, sed la grandeco de la malbonaĵo estas tute certa. 2.000.000 estas registritaj en Britujo kaj 3.000.000.en Germanujo kaj oni diras ke se similaj statistikoj estus kolektitaj en Usono, la nombro en tiu lando estus 10.000.000 aŭ eĉ 12.000.000.

La ciferoj pri pograndaj prezoj ankaŭ montras, ke la malaltiĝo de tiuj prezoj estis ĉiam kunigita de pliiĝo de senlaboreco. La faktoro mono havas do evidente tre grandan influon sur la krizo. En Francujo, kie ekzistas ankoraŭ tre malmulte da senlaboreco, pograndaj prezoj malaltiĝis malpli ol en aliaj industriaj landoj, kaj la pomalgrandaj prezoj eĉ pliiĝis iomete.

Ekzistas motivoj por kredi, ke la krizo alproksimiĝas al sia plej alta punkto, sed malfeliĉe ne ankoraŭ montriĝas antaŭsignoj de renoviĝo.

### La « Rondtabla » Konferenco pri Hindujo kaj la Internacia Labora Organizaĵo.

La tuta mondo interesiĝas pri la fama « Rondtabla Konferenco », kiu nun diskutas en London la problemojn de la estonta regado de Hindujo. Oni scias, ke, de la komenco, la demando pri federacia konstitucio altiris la plej grandan atenton, kaj ke la alcentriĝo de la pensoj de la princoj kaj de la reprezentantoj de Brita Hindujo sur ĉi tiu punkto fariĝis unu el la plej esperigaj faktoj de la Konferenco. La legantoj de la Bulteno scias, ke ĉi tiu demando havas tute specialan aspekton por la Internacia Labora Organizaĵo. Tiu aspekto estas aludita en la parolado farita en la « Rondtabla » Konferenco, la 20-an de Novembro, de Sro. Joshi, reprezentanto de la laboristoj de Hindujo, kiu estas tre bone konata en Genève.

« Sen iu diskuto pri la demando, ĉu la formo de regado devas esti unueca aŭ federacia », diris Sro. Joshi, « la laboristoj de Hindujo postulas, ke laborleĝdono restu ĉiam centra aŭ federacia afero, kaj ke la centra aŭ federacia Registaro ĉiam konservu la regadon kaj kontrolon de la

apliko de laborleĝoj. Se laborleĝdono kaj apliko de laborleĝoj estas lasata al Provincaj Registaroj aŭ al la konsistigaj partoj de la federacio, ili fariĝos tre malfacilaj. Se la konstitucio ne enhavos konvenajn aranĝojn pri tio, ĝi estos tute senutila por la laboristoj. Krom tio, ĉi tiuj aferoj devos esti centraj aŭ federaciaj aferoj ankaŭ rilate al la ratifo de la internaciaj laboraj konvencioj.

« Mi devas nun atentigi la Konferencon pri la fakto, ke, laŭ la naŭa paragrafo de Artikolo 405 de la Kontrakto de Versailles, federacia Ŝtato, kies ratifopovo estas limigita, sin ŝuldigas per pli facilaj internaciaj devoj pri laboro. Oni povas juĝi pri la malfavora praktika efiko por la laboristoj de ĉi tiu paragrafo de la Packontrakto per la fakto ke, dum malprogresema lando kiel Hindujo, sub unueca Registaro, povis ratifi dekunu konvenciojn de la Internacia Labora Konferenco, progresemaj landoj kiel Aŭstralio kaj Kanado, sub federaciaj Registaroj, povis ratifi nur po kvar konvenciojn. Mi do esperas, ke la povo de la Hinda centra Registaro, ĉu federacia aŭ unueca, por ratifi internaciajn konvenciojn kaj certigi ilian aplikon, estos neniel limigita....

« Mi devas nun aludi pri la Hindaj Ŝtatoj, kies partoprenon en la Hinda Konstitucio la Hindaj Laboristoj tutkore akceptos. Mi esperas, ke la reprezentantoj de la Princoj akceptos konstitucion, per kiu laborleĝdono kaj la apliko de laborleĝoj por tuta Hindujo kaj la ratifo de internaciaj konvencioj ne renkontos nenecesajn malfacilaĵojn. kaŭze de la formo de la Konstitucio. Ĝis nun la Hindaj Ŝtatoj faris nenion por akcepti ilian internacian devon pri laboro, sed mi esperas, ke ili faros sian devon estonte....

« Mi esperas, ke nia Konstitucio estos tiel formita en ĉi tiu Konferenco, ke Hindujo povos plene profiti de internacia agado kaj helpi je la internacia solvo de la problemoj de la mondo. »

### Raciigo kaj Senlaboreco.

Sro. L. Urwick, Direktoro de la Instituto pri Scienca Organizo de Laboro en Genève, eldonis broŝuron, en kiu li diskutas la demandon, ĉu raciigo de industrio okazigas senlaborecon. Li ekzamenas ciferojn lastatempe publikigitajn pri la situacio en Usono. De 1920 al 1927, 1.300.000 personoj lasis agrikulturon por alia laboro, sed almenaŭ 1.000.000 el tiuj estis elpelitaj per la movado de agrikulturaj prezoj, kiuj estis parte kaŭzita de politikaj influoj. Do oni povas diri, ke 300.000 personoj lasis agrikulturan laboron kaŭze de teknikaj plibonigoj. Samtempe ĉirkaŭ 585.000 personoj lasis industriajn laborojn por la sama motivo. Dum la sama tempo la tuta pliiĝo de senlaboreco, krom tiu en agrikulturo, esti 654.000 personoj. Sekve oni povas diri, ke 1.445.000 personoj perdis sian okupadon rezulte de teknikaj ŝanĝoj.

Kontraŭe la granda kresko de la aŭtomobila industrio okazigis la okupadon de 1.300.000 personoj en novaj okupoj en ĉi tiu industrio. Okupado multe pliiĝis en la kuracista kaj similaj profesioj (407.000), en hoteloj kaj restoracioj, kinematografio, bankoj kaj asekuro (616.000). Sro. Urwick kalkula ke ĉirkaŭ 1.907.000 novaj okupoj estis kreitaj rezulte de raciigo, kontraŭ 1.445.000 kiuj estis forigitaj.

En Francujo, kie raciigo multe progresis, senlaboreco apenaŭ ekzistas ; kontraŭe laboristoj mankas.

Tiuj faktoj kredigas, ke raciigo produktas pli da laboro ol tiu, kiu ĝi forigas, kaj ke parto de la senlaboreco en Granda Britujo estas kaŭzita de nesufiĉa raciigo.

### La Kvindeka Kunsido de la Administra Konsilantaro.

La Kvindeka Kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo okazis en Bruxelles de la 7-a al la 12-a de Oktobro, laŭ invito de la Belga Registaro.

Okaze de la malfermo de la kunsido, la Prezidanto Sro. Fontaine, sincere laŭdis Belgujon pro ĝia kunlaboro kun la Internacia Labora Organizaĵo. Belgujo ratifis kaj aplikas multajn internaciajn laborajn konvenciojn. Ĝi estis la unua de la grandaj industriaj landoj, kiu ratifis la Washingtonan Konvencion pri Laborhoroj. Ĝi ratifis ĝin senkondiĉe kaj aplikis ĝin lojale.

La reprezentanto de Argentino, Sro. Cantilo, ĉeestis la kunsidon, post foresto dum pluraj jaroj.

La konsilantaro konsideris la proceden, kiun oni devus adopti por la prezentado al la Konferenco en 1931 de la demando pri laborhoroj en karbminejoj. Ĝi akceptis, per 16 voĉoj kontraŭ 5, rezolucion deklarantan, ke la Konferenco mem devos decidi, ĉu ĝi pritraktos la demandon per unua aŭ dua diskutado, sed ke, ĉar konvenas doni al la Konferenco okazon por adopti unu aŭ alian solvon, kaj ĉar estas neeble forigi la pritrakton per unu sola diskuto, speciale post la ekzameno de la problemo en la Kunsido en 1930, la Konsilantaro aprobis la disdonon al la Registaroj de demandaro redaktita de la Oficejo, kaj komisiis al la Oficejo, ke ĝi preparu por prezentado al la Konferenco (se ĝi decidos procedi per unu sola diskuto) Raporton enhavantan projekton aŭ plurajn projektojn de konvencio sur la bazo de la respondoj de la Registaroj. Ĝi ankaŭ komisiis al la Direktoro la kompletigon de la informoj pri lignito.

La Konsilantaro ankaŭ diskutis, kiuj demandoj povas esti enmetitaj en la tagordon de la 1932 Kunsido de la Konferenco. Ĝi estis provizita per raporto de la Oficejo pri pagataj dungoficejoj, kaj ĝi decidis, enmeti en la tagordon la demandon pri la forigo de tiaj oficejoj. Ĝi ankaŭ provizore elektis la demandon pri asekuro kontraŭ invalideco, maljuneco kaj morto, la demandon pri pagataj ferioj, kaj la demandon pri asekuro kontraŭ senlaboreco.

La Konsilantaro diskutis la organizon de la Prepara Teknika Konferenco pri Maraj Demandoj, kiun oni jam decidis kunvenigi en 1931. Ĝi decidis, ke ĉi tiu konferenco okazos en Oktobro 1931. Ĝi ampleksos ĉiujn landojn, kies marŝipoj, ekskluzive tiuj de malpli ol 100 tunoj, reprezentas sentaran tunaron je pli ol 250.000 tunoj. Tiuj Ŝtatoj, aranĝitaj laŭ tunaro, estas la jenaj : Granda Britujo, Japanujo, Germanujo, Norvegujo, Francujo, Italujo, Nederlando, Svedujo, Grekujo, Danujo, Kanado, Brazilo Belgujo, Aŭstralio, Argentino, Ĉinujo, Finnlando, Jugoslavio, Portugalo kaj Hindujo.

Ĉiu Ŝtato devos sendi unu reprezentanton de la Registaro, unu de la mastroj kaj unu de la laboristoj. La reprezentantoj povos esti akompanataj de teknikaj konsilantoj. La Administra Konsilantaro estos reprezentata en la Konferenco de tri membroj, unu el ĉiu grupo. In reprezentanto de ŝipposedantoj aŭ maristoj en la Komuna Mara Komisiono povos ĉeesti la Konferencon, sed ne rajtos voĉdoni.

La Konsilantaro konsideris la raporton de la Konferenco pri silikozo, kaj decidis sendi ĝin al la Registaroj kaj atentigi ilin pri ĝiaj rekomendoj. Ĝi ankaŭ akceptis proponon de Sro. Schürch, la Svisa laborista representanto, por ke la Oficejo faru ampleksan studon pri la kaŭzoj de senlaboreco.

Responde al demando de Sro. Poulton, la reprezentanto de la Britaj laboristoj, Sro. Lawson, reprezentanto de la Brita Registaro, diris, ke, malgraŭ la malfacilaĵoj renkontitaj, la Brita Registaro ĉiam intencas, fari ĉion necesan, kiel eble plej baldaŭ, por ratifi la Washingtonan Okhoran Konvencion.

# PAĜO PRI KOOPERADO

**La Dektria Kongreso de la Internacia Kooperativa Alianco.**

La Dektria Kongreso de la Internacia Kooperativa Alianco okazis en Vieno de la 25a al la 28a de Aŭgusto 1930. Ĉeestis 554 delegitoj el 53 diversaj landoj, krom pluraj reprezentantoj de Registaroj kaj de internaciaj organizaĵoj, kiel la Ligo de Nacioj kaj la Internacia Laboroficejo.

Ĝi estis sendube unu el la plej gravaj kunvenoj de la Alianco depost ĝia unua kongreso en 1895. La regularo de la Alianco permesas la aliĝon de ĉiuspecaj kooperativoj, produktantaj, agrikulturaj, kreditaj kaj aliaj societoj ĉiam partoprenis en ĝi. Sed ĝis nun oni ĉiam rigardis la Aliancon, kiel precipe reprezentantan la konsumkooperativojn. La raporto de Sir Thomas Allen pri la rilatoj inter konsumaj kaj agrikulturaj kooperativoj kaj la aliĝo, tuj antaŭ la kongreso, de la Franca Nacia Kaso de agrikultura Kredito (Caisse Nationale de Crédit agricole) kaj de la Kanada Kooperativa Tritikoproduktantaro (Canadian Cooperative Wheat Producers) definitive montris la Aliancon, fakte, same kiel teorie, internacia organizaĵo por kunigi ĉiujn formojn de kooperativoj.

La diskuto de la Raporto de la Centra Komitato finiĝis per la akcepto de tri rezolucioj. La unua instigis ĉiujn konsumantojn, ĉiujn kooperativajn organizaĵojn kaj ĉiujn laboristojn en ĉiuj landoj, ke ili influu sur siaj Registaroj kaj, per ili, sur la Ligo de Nacioj, por ke, per la aranĝo de longtempaj kaj liberalaj komercaj konvencioj, la starigo de unuforma doganterminaro, naciaj kaj internaciaj transitkonvencioj, doganaj unuiĝoj kaj ĉiuj aliaj konvenaj rimedoj, la libera interŝanĝo de komercaĵoj kaj senlimigita interkomuniĝo estu laŭeble restarigataj, la popolo estu liberigata de la konstanta minaco de malaltigita vivnivelo, kaj ke produktado estu renovigata per la pliigo de la aĉetopovo de la konsumantaro. La dua rezolucio instigis ĉiujn konsumantojn, kaj speciale la virinojn, kiuj prizorgas la familiajn bezonojn, ke ili sin organizu kooperative por sia komuna protekto, kaj por energie propagandi por certigi ke naciaj karteloj estu submetataj al la Ŝtato kaj la internaciaj al potenca fako de la Ligo de Nacioj. La tria rezolucio, pri la ekonomia politiko de la Alianco, prezentita de Sro. Albert Thomas, en la nomo de la Franca Delegitaro, petis la Centran Komitaton : (1) ke ĝi konservu kaj eventuale pligrandigu la specialan komitaton, kiun ĝi starigis post la Stockholma kongreso por prepari programon ; (2) ke ĝi daŭrigu kaj kompletigu la starigon de tiu programo antaŭ la sekvonta kongreso ; (3) ke ĝi profitu de ĉiu okazo prezentata de internaciaj ekonomiaj agadoj, por rekomendi kaj enkonduki kooperativajn principojn, kiuj solaj, en la nuna anarkia stato de profitema mondo, povus malfermi novan epokon de ordo, justeco kaj paco ; kaj (4) ke ĝi eldonu specialan ĉiujaran raporton, sciigantan la naciajn organizaĵojn aliĝintajn al la Internacia Kooperativo Alianco pri la laboro farita kaj la rezultatoj atingitaj.

La Kongreso diskutis raportojn pri la rilatoj inter konsumaj kaj agrikulturaj kooperativoj kaj akceptis la jenan rezolucion :

La Kongreso kore aprobas la klopodojn faritajn de la Internacia Kooperativa Alianco por starigi organajn rilatojn inter la diversaj kooperativaj organizaĵoj de konsumantoj kaj de agrikulturaj produktantoj, kiel unu el la plej bonaj metodoj por solvi la problemon de la vendigo de agrikulturaj produktaĵoj kaj samtempe natura stadio en la evoluado de la kooperativa movado kiel tutmonda ekonomia potenco. La Kongreso urĝe petas la Centran Komitaton, ke ĝi daŭrigu siajn klopodojn por efektivigi la unuiĝon de la du grandaj fakoj de kooperativa entrepreno, fari ĉion eblan por difini la esencan kooperativan bazon de la diversaj formoj de organizaĵoj, stimuli la kreadon de tiuj organizaĵoj kaj varbu ilin al la Internacia Kooperativa Alianco.

La Kongreso diskutis raporton de Sro. Klepzig (Germanujo) pri la principoj de kooperado kaj modernaj sistemoj de kreditkomerco kaj akceptis rezolucion instigantan la aliĝintajn societojn, ke ĝi konservu la bone elprovitan principon de kontanta pago kaj kontraŭstaru la vendon kredite al membroj de konsumkooperativoj.

Dum la diskuto Sro. Fauquet, en nomo de la Franca Delegitaro proponis aldonan rezolucion, kiu kvankam kondamnante kreditan vendadon, rekomendas metodon por provizi kooperative la solan aprobatan formon de kredito, tio estas, kredito celanta plibonigon de la ekonomia situacio de la prunteprenanto. La rezolucio proponas la disigon de kreditaj kaj vendaj negocoj per la starigo de kooperativaj bankoj kaj kreditsocietoj. La rezolucio estis akceptita de la Kongreso.

**Bulgarujo.**

**La Ligo de Nacioj kaj la Bulgara Kooperativa Movado.**

Dum sia kunsido la 25-an de Septembro, la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj devis konsideri raporton de la Financa Komitato pri la peto de la Bulgara Registaro al la Ligo de Nacioj por kunlaborado je pli bona organizo de kooperativoj en Bulgarujo.

La Financa Komitato, en sia raporto, rekomendis, ke la Konsilantaro respondu favore al la peto de la Bulgara Registaro, bazante sian rekomendon sur la jenaj motivoj :

« Farante siajn antaŭajn esplorojn, kaj speciale okaze de la eldono de la Prunto por Stabiligo, la Komitato ĉiam opiniis, ke tiu reorganizo estas nepre necesa. La Bulgara Registaro do prave rigardas ĉi tiun reformon, kiel kompletigon al la financa restarigo entreprenita en Bulgarujo sub la aŭspicioj de la Ligo. La kooperativa sistemo, se ĝi konformiĝas al la gustoj kaj bezonoj de la nacio kaj estas bone organizita, povas multe helpi pri ekonomia progreso, kaj oni povas gratuli la Bulgaran Registaron, ke ĝi komprenis la neceson, kompletigi tiumaniere la laboron faritan por enloĝigi la rifuĝintojn kaj restarigi la financojn. La iniciato de la Bulgara Registaro povos havi aliajn ne malpli gravajn sekvojn. La Financa Komitato estas konvinkita, ke rezulte de la enketoj farotaj kaj la sekvonta reorganizo, la principoj adoptitaj por la apliko de la kooperativa sistemo povos esti utilaj al aliaj ŝtatoj kie similaj kondiĉoj ekzistas. »

La Konsilantaro respondis favore al la Bulgara Registaro kaj decidis, sendi al Bulgarujo du spertulojn pri kooperado.

Ĉi tiuj spertuloj, Prof. H. Gebhard (Finnlando), kaj Sro. B. Treybal (Ĉeĥoslovakio), komencis sian laboron la 10-an de Oktobro.